BRAZILA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO

de "BRAZILA LIGO ESPERANTISTA"

11-a Jaro — *Numero 1-3*

Aliĝo al B. L. E. 5$000 Jarabono eksterlande Fr. 5 (Svisa valoro)	Januaro-Marto 1920	REDAKCIO—Praça 15 Novembro, 101 RIO DE JANEIRO — BRAZILIO

Aos Esperantistas Brasileiros

Proseguindo na ardua campanha que tomou sobre seus hombros, a «Brazila Ligo Esperantista» renova seu appello a todos os samideanos brazileiros, solicitando-lhes o imprescindivel auxilio intellectual e material em prol da realização de nossas communs aspirações.

Urge publicar, com a possivel regularidade, o nosso orgão especial de propaganda, que é o «Brazila Esperantisto», urge desenvolver os cursos, estimular as applicações praticas do Esperanto em nosso meio, desenvolver, emfim, sob todos os aspectos, a empreza que nos foi commetida.

E' a todos os Esperantistas do Brazil que ora nos dirigimos. Que todos secundem os nossos esforços com suas luzes e sua dedicação. Que todos se inscrevam entre os membros da Liga, para que, mediante modestissima contribuição annual, prestem o seu concurso material a nossa causa. Que se filiem ao grupo de sua localidade, se esta o possue filiado á Liga; e que, na hypothese de já serem associadas, que pugnem pelo seu desenvolvimento angariando e convencendo novos adeptos para que estes se agremiem, e por sua vez concorram.

O que um grande esforço e o ingente sacrificio de poucos não logra obter, a infima contribuição de muitos attinge facilmente, e sem sacrificio para ninguem.

As gottas d'agua são pequeninas, e no entanto, ellas fazem o mar. Sen gutoj malgrandaj maroj ne ekzistus.

As condições de adhesão á Liga são as seguintes:

Os grupos filiados pagam uma quota annual de, pelo menos, 15$000, correspondente a seis socios.

Qualquer socio de grupo filiado poderá adherir á Liga pagando a contribuição annual de 2$500.

O socio isolado paga a contribuição annual de 5$000.

Todo socio da Liga recebe gratuitamente o «Brazila Esperantisto».

E' socio bemfeitor toda a pessoa que fizer á Liga, de uma só vez, uma doação de, pelo menos, 200$000.

Rio de Janeiro, 1.º de Março de 1920.

A Directoria:

Alberto Couto Fernandes—*Presidente*
Dr. Venancio da Silva—*Vice-Presidente*
João B. Mello e Souza—*Secretario geral*
Odillo Pinto—*1.º Secretario*
Yrany Baggi de Araujo—*2.ª Secretaria*
Edmundo Felix Tribouillet—*Thesoureiro.*

BRAZILA LIGO ESPERANTISTA

UNUA GENERALA KUNSIDO

(23 Februaro)

Estas aklamita por prezidis la kunsidon dro Alcibiades Correia Paes, kiu elektis kiel sekretariojn srojn Odillo Pinto kaj Carlos Domingues.

Sro J. B. Mello e Souza, unua sekretario, legis la raporton prezentitan de la prezidanto, sro Alberto Couto Fernandes, kaj la bilancon de la kasisto, sro. E. Felix Tribouillet.

Por ekzameni tiun ĉi la prezidanto elektis komitaton konsistantan el sroj ing.o Antonio C. de Arruda Beltrão, kapitano Pedro Malheiros kaj dro Venancio da Silva.

Estas aprobita propono prezentita de Sro A. Couto Fernandes kreanta postenon de ĝenerala sekretario, kiu sin okupos pri la eksterlanda korespondado.

DUA ĜENERALA KUNSIDO

(26 Februaro)

Prezidis dro Alcibiades Paes.

Estas elektita la jena nova estraro:

Prezidanto—Ing.o Alberto Couto Fernandes.
Vicprezidanto—Dro Venancio da Silva.
Generala Sekretario—Dro J. B. Mello e Souza.
1.a Sekretario—Sro. Odillo Pinto.
2.a Sekretariino—Fino Yrany Baggi de Araujo.
Kasisto—Sro Edmundo Felix Tribouillet.

Tuj poste estas aprobita la raporto favora al la aprobo de la bilanco de l' kasisto.

Estas unuvoĉe aprobitaj la jenaj dankesprimoj:

Al dro Amaro Cavalcanti, eksĉefurbestro, kiu donis la nomon Zamenhof al unu el la stratoj en Rio de Janeiro kaj al dro Manoel Cicero Peregrino da Silva, eksdirektoro de la Publika Instruado, kaj provizora ĉefurbestro en Rio de Janeiro, kiu permesis la instruadon de Esperanto en la lernejoj kaj sankciis la leĝon aprobitan de la Ĉefurba Konsilantaro, — prezentitaj de sro Antonio C. de Arruda Beltrão.

Al sro senatano Manoel P. Oliveira Valladão kaj kolonelo J. J. Pereira Lobo, prezidanto de Ŝtato Sergipe, pro la grandaj servoj faritaj al nia afero, precipe pro la helpoj donitaj al la enkonduko de Esperanto en la publikajn lernejojn—prezentitaj de sro A. Couto Fernandes.

Al droj Edison Lacerda, deputato en Sergipe, kaj Antonio Maximo Nogueira Penido, eksurbkonsilanto en Rio de Janeiro, pro la de ili prezentitaj projektoj, kiuj poste fariĝis leĝoj, pri la instruado de Esperanto en la publikaj lernejoj—prezentitaj de sro Mello e Souza.

TRIA ĜENERALA KUNSIDO

(28 Februaro)

Okupis la prezidan lokon dro Alcibiades Paes kaj la sekretariajn lokojn sroj Odillo Pinto kaj Carlos Velloso.

Post la legado de la protokolo de la lasta kunsido la prezidanto invitis la novajn estraranojn por preni siajn lokojn.

Sro A. Couto Fernandes dankis siajn kunliganojn pro la honoro kiun ili faris al li, reelektante lin kiel prezidanton de Brazila Ligo kaj prezentis la dankojn de siaj kunestraranoj. Li ankaŭ faris alvokon al ĉiuj brazilaj esperantistoj por ke ili aliĝu al Brazila Ligo kaj donu al ĝi sian intelektan kaj materialan helpon.

Dro Venancio da Silva, vicprezidanto, dankis sian elekton kaj diris kelkajn laŭdajn vortojn pri la agado de dro Alcibiades Paes en Sergipe kaj deziris al li kaj al lia edzino feliĉan vojaĝon.

Dro Alcibiades Paes dankis la ĝentilecon de dro Venancio da Silva kaj submetis al la diskutado de la ĉestantoj novan reguliaron de la ekzamenoj de Esperanto, kiu estas aprobita.

Poste li prezentis kaj estas aprobita deziresprimon al la Societo de Geografio de Rio de Janeiro, kiu pruntdonis unu el siaj ĉambroj por la propagando de Esperanto.

Car oni aprobis proponon subskribitan de l' profesoroj de Esperanto sroj Couto Fernandes, Alcibiades Paes kaj fino Julia Fernandes, estas al dro Venancio da Silva donita la rajto ricevi la diplomon de profesoro de Esperanto, laŭ la lasta regularo.

Li ankaŭ proponis ke la 6.a Brazila Kongreso de Esperanto okazu en Rio de Janeiro dum la jaro 1921, kio estas aprobita.

Fine dro Venancio da Silva prezentis dankesprimon, kiu estas unuvoĉe aprobita, al la brazila gazetaro kaj precipe al tiu de Rio de Janeiro, kiu ĉiam elmontris sian simpation al Esperanto kaj ĝentile helpas la propagandon de la glora kreitaĵo de dro Zamenhof.

SALUTO

al dro Alcibiades Paes kaj lia edzino farita de dro Mello e Souza, ĝenerala sekretario de B. L. E., okaze de la Esperantista Teo al ili dediĉita.

«Kiel karesa kaj amika homaĝo al vi kaj al via Edzino, jen estas, Dro. Alci-

biades Paes, ĝoja kunveno de l'geesperantistoj de Rio de Janeiro. Malgranda, humila, senluksa homaĝo la nia; sed sincera, kredu; profunde sincera!

Plie,—karega amiko—por kio taŭgus nenecesaj eksteraĵoj, kiam la sola signifo kaj deveno de niaj agoj troviĝas en la kumunaj sentoj kiujn ni gardas ĉe l'koroj?

La granda filozofo Sokrates, al kiu oni diradis ke malvasta ŝajnas lia domo, respondis: «Volu dioj ke, eĉ malvasta, ĝi estos ĉiam plena je bonaj amikoj!»

Dank'al Dio, Gesinjoroj, ni, esperantistoj, povas diri ke ĉe nia sidejo malvasta kunvenis amaso da bonegaj amikoj, kies koroj unusone batadas per la sama vibrado kaj fervoro».

Sekve, la parolinto elmontris la tute originalan, interfratigan kaj serenan ĝojojn kiu regas nur ĉe la esperantistaj kunvenoj, «sub la verda stelo», «kiam» (li diris), «momente forlasinte la eksteran bataladon, ni vidiĝas inter niaj geamikoj, niaj gesamideanoj, kaj revidas sur iliaj brustoj la karan verdan steletan, simbolon de paco, espero kaj fido. Egalan plezuron sentis la famega itala poeto kiam li sukcesis foriri el la teruraj inferaj profundegaĵoj, kaj sin trovis en ĉarma, dolĉplena kamparo, el kie li povis revidi la stelojn:

«E quindi uscimmo a riveder le stelle»...

Post entuziasma elklarigo de l'esperantistaj idealoj, kaj post laŭdoj je la obstinemo kaj fervoro de ĝiaj batalantoj, Sro. Mello e Souza rakontis jene la apero de Dro. Alcibiades ĉe la esperantistaj rondoj:

«De kiam estis ĵus aperintaj en Rio la plej malnovaj esperantistoj, aperis ankaŭ en Sergipe klera kaj brila junulo, la unua kiu prezentiĝis por fari la kurson per korespondado iom antaŭe kreita. Sed, kvazaŭ la diino Minerva, kiu, laŭ rakontas la legendo, jam naskiĝis altkreska kaj tute armita, tiel ankaŭ Dro Alcibiades, kiam li aperis, montriĝis jam klera scianto pri nia lingvo kaj fervora kunhelpanto».

La parolinto sekve iom diris pri la gravaj triumfoj de esperanta propagando en Sergipe, kies plej sindonema kaj nelacigebla gvidanto estas Dro. Alcibiades. Poste li pruvis ke, batalante por Esperanto ni, ne nur faras prohomaran laboron, sed ankaŭ utilas al nia lando, kies progresadon la internacia idiomo sendube helpos.

Tiamaniere li finis sian paroladeton:

«Nia lando! Nia kara Patrolando! Ankaŭ pro la amo kiun ni dediĉas al Brazilio, ni devas, gesamideanoj, deziregi la venkon de Esperanto. Mi neniam opiniis ke nia idealo de Universala Frateco kaj nia patruja sento estus kontraŭaj kaj neharmoniaj. Ne! Tuto ne! Brazilano ĉiam, kaj esperantisto fervora, mi kredas, mi sincere kredas ke per Esperanto, dank'al Esperanto ni povas fari al nia amata lando plej grandajn servojn.

Nun la mondo trapasas gravegan historian epokon. Post teruriga militado, la civilizita mondo refariĝas. Nacioj falegas; aliaj formiĝas; nacioj reaperas; kaj meze de tiel agoplenaj laboroj, nia Patrolando devas ankaŭ labori, kaj preparigi sian estontecon.

Tro klaraj motivoj pruvas ke en tiu batalado ekonomia, komerca, etnika, sociala kaj politika, Brazilio nur povas profiti per la enkonduko ĝenerala de tia internacia tutmonda ligilo, kiu estas Esperanto. Ni klopodu, do. Tion postulas nia homara sento; tion postulas nia amo al la Patrujo.

Al vi, Esperantistoj de Sergipe, kiuj de longe komprenis la grandecon de tia idealo, kaj al ĝi donacis viajn plej bonajn fortojn, al vi niajn salutojn, niajn aplaŭdojn, niajn korojn».

Feino de l' Floroj

El «Paraisos interiores», de Homero Prates.

Ĉu vi neniam vidis ĝin, la feliĉon? Ĝi estas en nia ĝardeno. Ĝi estas tre proksima al ni, kun mirmieno pro tio ke ni anhoraŭ ne sentis ĝin, en ĝia nevidebla ĉeesto... Estas ĝi mem persone, kiu venas kantadi silente kanton ĉe nia fenestro dum la lunaj noktoj. Tio estas la Feino de l' floroj, al kiuj ĝi vivigadas per sia komuna kaj ĉiela elspiraĵo, laŭ la maniero de l' printempo...

Kiam ni nin rigardas silente, ĉu vi ne aŭdas specon de bruo kun grandaj flugiloj ĉe nia orelo, iun kiel nedifinitan spiradon de iu—kiu ne estas ni—kiu ĉeestas nian idilion kaj kiu tuj poste forflugas, malŝateme, tre malproksimen? Ĉu vi ne sentas, kiel pian kaj dian Ombron, ke io nemortema, kaj luma, io ekstertera—krom niaj animoj kiuj sin kisas—venas unuigi niajn fruntojn, dolĉe, kiam ni ridetas unu la alian sen kaŭzo? Estas la feliĉo. Ĝi ekzistas. Ĝi estas la Feino de l' ĝardenoj, la dolĉega Aperaĵo, kiu venas edkormigi nin per siaj

vortoj pli oraj ol la mielo kaj pli puraj ol la akvoj de l' antikvaj fontoj, kie la dioj sin rigardadis...

Tradukis

Stella de Almeida.

Regulamento dos exames de Esperanto

A *Brazila Ligo Esperantista* institue, para si e para os clubs ou grupos filiados, duas especies de exame: *elementar* e *superior.*

Ao exame elementar corresponde um certificado de estudo *(atesto pri lernado).* O superior dá direito ao diploma de *profesoro aprobita.*

EXAME ELEMENTAR

O exame elementar de Esperanto constará de duas provas: escripta e oral.

Prova escripta: a) traducção para o Esperanto de um trecho do livro de exercicios indicado para o curso; *b)* traducção para o portuguez de um trecho dictado, de 12 a 15 linhas, de um livro facil, como *Karlo* de Ed. Privat, *Unua Legolibro* de Kabe, etc.

Prova oral: a) leitura e traducção de 20 linhas de um dos livros recommendados para a escripta; *b)* arguição sobre questões grammaticaes que o texto suggerir; *c)* ligeiro ensaio de conversação.

EXAME SUPERIOR

O exame superior constará de três provas: escripta, oral e pratica ou de exposição.

Prova escripta: a) fazer em Esperanto uma carta ou descripção sobre assumpto dado no momento pela commissão examinadora; ou então traduzir para o Esperanto 12 a 15 linhas de boa prosa brasileira ou portugueza; *b)* traduzir para o portuguez, sem auxilio de diccionario, 20 linhas dictadas de prosa da *Fundamenta Krestomatio.*

Prova oral: a) leitura e traducção de um trecho de 20 a 25 linhas da *Fundamenta Krestomatio ou Esperantaj Prozajoj*; *b)* arguição em Esperanto sobre grammatica, historia e literatura da lingua.

Prova pratica. — Exposição de um ou dois pontos de grammatica, tirados á sorte. O candidato terá 20 minutos para reflectir, não lhe sendo permettido utilizar-se de livro ou nota.

Em qualquer dos dois exames, as notas serão cotadas de *0* a *10.* Nos exames elementares serão approvados *com distincção* aquelles que lograrem a média *10* ou mais de *9,5*; *plenamente,* os de média 6 a 9,5; e *simplesmente,* os que tiverem mais de 3 e menos de 6. Nos exames superiores não haverá graus de approvação: o candidato será, ou não, approvado.

EXAMINADORES

Para os exames elementares a commissão examinadora será constituida pelo professor do curso, o presidente do club ou grupo, que será o presidente da banca, e um terceiro por este indicado. A acta será lavrada em livro especial, que ficará no archivo do club. Findo o exame, será remettida copia da acta á *Brazila Ligo Esperantista,* que expedirá os certificados.

Para o exame superior a banca examinadora será constituida, na séde da *B. L. E.*, pelo seu presidente, que nella terá a mesma funcção, e por dois professores diplomados por elle escolhidos; e, nos Estados, pelo presidente do club e por dois esperantistas por este indicados, sendo que pelo menos um membro da commissão deve ser *profesoro aprobita.*

TAXAS DE EXAME

A inscripção para o exame elementar é gratuita. A retirada do certificado custará 2$000.

Esse certificado será passado pela *B. L. E.* e entregue ao candidato pelo club ou grupo filiado.

Para isso, o club, juntamente com a cópia das actas, deverá remetter á Liga 50% da importancia dos certificados requeridos. Estes serão assignados pelos presidentes da *B. L. E.* e do club e pelo professor do curso.

Para o exame superior, o candidato deverá pagar, no acto da inscripção, a quantia de 5$000, que caberá toda á Liga. A acta dos exames, no Rio, será lavrada em livro especial, guardado no archivo da Liga. Nos Estados, o termo será lavrado em livro especial do club — termo do qual se remetterá uma cópia á Secretaria da Liga, onde ficará archivada. O diploma será conferido pela *B. L. E.* e assignado pelo seu presidente e 1.º secretario e pelo diplomado.

EXAMES POR CORRESPONDENCIA

Para os candidatos residentes longe da séde dos clubs ou grupos filiados fica instituido um certificado de estudos *(atesto pri lernado)* por correspondencia.

A prova unica de exame constará: *a)* de uma traducção para o portuguez de 30 linhas, de prosa da *Fundamenta Krestomatio*; *b)* resposta a algumas perguntas grammaticaes que o texto tiver suggerido ao organizador do ponto; *c)* versão para o Esperanto de um texto portuguez facil, de 12 a 15 linhas.

A taxa para esses exames será de 3$000, de que 2$000 serão pagos no acto da inscripção, para que o candidato tenha direito a receber os textos, e os 1$000 restantes após a approvação, para que lhe seja expedido o certificado.

Os textos serão examinados por três professores nomeados pelo presidente da Liga.

OBSERVAÇÕES

Podem candidatar-se aos exames de Esperanto quaesquer pessoas, tenham ou não seguido os cursos mantidos pelos clubs.

Ao exame superior, porém, só será admittido quem já tiver prestado o elementar.

EXAMES DE PROMOÇÃO

Além dos exames *elementar e superior* de Esperanto, instituidos pela Liga, haverá ainda, nas escolas primarias e complementares, particulares ou officiaes, onde o ensino de Esperanto fôr permittido, *exame de promoção*.

O exame de promoção consta de duas provas: escripta e oral.

Prova escripta: a) traducção para o Esperanto de cinco frases, tiradas da grammatica ou livro de exercicios adoptado no curso; *b)* um dictado de 8 a 10 linhas do *Fundamento de Esperanto* ou do *Legolibreto*.

Prova oral: a) leitura e traducção de um texto esperanto do livro de leitura seguido no curso; *b)* responder ás questões elementares de grammatica que forem propostas.

Para este exame a commissão examinadora será constituida como para o elementar. Quanto ás notas e classificação dos alumnos, serão as mesmas adoptadas na escola.

DISPENSA DE EXAME

A *Brazila Ligo Esperantista*, durante suas sessões plenas, poderá conferir o titulo de *profesoro aprobita* aos que hajam publicado em esperanto obras de reconhecido valor — mediante proposta subscripta por três professores diplomados.

12.º Congresso Universal de Esperanto

Terá lugar em Haya, de 8 a 15 de Agosto do corrente anno, o 12.º Congresso Universal de Esperanto.

As sessões solemnes realizar-se-ão no mais antigo e historico salão de Haya — o «Ridderzaal» (Salão de Cavalleiros).

Fazem parte da Commissão de Honra pessoas da mais alta representação da Hollanda, entre as quaes citamos o Prefeito de Haya.

Em 28 de Fevereiro já se achavam inscriptos mais de cem esperantistas dos seguintes paizes: Dinamarca, França, Inglaterra, Allemanha, Italia, Hespanha, Hollanda, Polonia, Suissa e Belgica.

No programma provisorio figuram as seguintes festas: Matinée musical á beiramar. Excursão em lancha de Leiden ao famoso lago «Kagermeer». Passeio á floresta de Haya e visita ao Palacio da Floresta. Visita ao Palacio da Paz e passeio pelas ruas de Haya em bonds ornamentados. Concerto na Floresta de Haya. Baile em costumes nacionaes.

O cartão de congressista custa 10 florins hollandezes. Toda correspondencia deve ser dirigida ao Secretario Snr. J. L. Bruijn. Haya.

KRONIKO

Maranhão. — *S. Luiz.* Okaze de Pedagogia Kongreso efektiviĝinta dum la monato Februaro sro. Domingos Perdigão, direktoro de la Nacia Biblioteko, faris paroladon pri la internacia lingvo Esperanto. Je la 4 a de Marto li malfermis en la sidejo de la Fakultato de Leĝoscienco kurson de Esperanto specialan por geinstruistoj.

Ceará. — *Fortaleza.* La 24 an de Decembro la grupo «Samideanaro» efektivigis feston por solenigi la Kristnaskon kaj la naskiĝan daton de Zamenhof.

Bahia. — *S. Salvador.* La ĵurnalo «Diario da Bahia» publikigis artikolon pri la 12 a Universala Kongreso de Esperanto.

Rio de Janeiro. — La 16 an de Januaro okazis en la sidejo de *Brazila Klubo «Esperanto»* ekzamenoj de la internacia lingvo al kiu submetiĝis la jenaj gelernantoj de fino Esther Bloomfield, dua sekretarino de tiu klubo: Elizabeth Lydia Bloomfield, Natividade Luiza de Oliveira, Anna Paes Torres, Termutes Maciel Soares kaj David Bloomfield.

Ĉiuj estas aprobitaj kaj rajtas ricevi la *ateston pri lernado.*

Prezidis la ekzamenojn dro. Alcibiades C. Paes, unua sekretario de Esperanto Klubo de Aracajú laŭ invito al li farita de l' prezidanto de Brazila Klubo, dro Antonio C. de Arruda Beltrão.

Je la 21 de Februaro en la sidejo de Brazila Klubo «Esperanto» okazis Esperantista teo dediĉita al la kleraj geprofesoroj de Esperanto el Sergipe dro Alcibiades Correia Paes kaj lia edzino sino Consuelo Menezes Paes.

Ĝin ĉeestis multaj geanoj de «Brazila Klubo», de «Brazila Ligo Esperantista» kaj de «Virina Klubo».

En la nomo de Brazila Ligo faris oficialan saluton, kiun ni publikigas aliloke, la ĝenerala sekretario, dro J. B. Mello e Souza, kaj en la nomo de Brazila Klubo parolis ĝia prezidanto, dro Antonio C. de Arruda Beltrão, kiu donacis al sino Consuelo Paes belan bukedon de diantoj.

Al tiuj salutoj respondis dro Alcibiades, vere kortuŝita. Ĉiuj estas varme aplaŭditaj.

Poste deklamis poeziojn en la esperanta kaj portugala lingvoj la jenaj personoj: finoj Yrany Baggi de Araujo, Regina de Barros, Ruth Mascarenhas, Anna Paes, Elizabeth Bloomfield kaj Natividade Luiza de Oliveira kaj sroj José M. Reis Perdigão kaj A. Couto Fernandes.

Oni regalis la ĉeestantojn per teo kun biskvitoj. Pri tiu intima festo parolis la ĵurnaloj kaj la revuo «Careta» aperigis belan fotografaĵon.

— Je la 23 a, 26 a kaj 28 a de Februaro okazis ĝeneralaj kunsidoj de Brazila Ligo Esperantista, pri kiuj ni detale parolas aliloke.

—La 23 an de Marto dro A. Couto Fernandes malfermis, en la sidejo de Brazila Klubo, elementan kurson de Esperanto.

Estas tre ĝojiga la fakto ke la gazetaro pli kaj pli interesiĝas pri Esperanto.

Preskaŭ ĉiuj ĵurnaloj publikigis sciigojn pri la XII Universala Kongreso de Esperanto, pri la kunvenoj okazintaj en Rio de Janeiro kaj pri la uzado de Esperanto kiel reklamilo por la internaciaj foiroj.

Krom tio, ni citas speciale:

«A Tribuna» aperigis longan intervjuon kun dro A. Couto Fernandes, prezidanto de B. L. E. kaj lian portreton.

«A Rua» publikigis tradukojn de artikoloj aperintaj en la gazeto «Esperanto» kaj artikolon pri la kongreso de la laboristoj.

«Rio Jornal» aperigis artikolon sub la titolo «Ĉu la oficiala lingvo de la proksimaj kongresoj estos Esperanto?» kun la portreto de profesoro A. Meillet; alian tilolitan «La aktiveco de Esperanto» kun fotografaĵo de poŝtkarto sendita de Internacia Komerca Revuo al Brazila Ligo Esperantisto pri la Leipzig'a Foiro, kaj alian pri la Finnlanda Foiro.

«O Imparcial» publikigis tradukon de la letero de l' vicprezidanto de la Societo de Londonaj inĝenieroj al la revuo de la Ligo de Nacioj.

A. C. F.

O Esperanto no Estrangeiro

Inglaterra — As sociedades e grupos esperantistas nas ultimas semanas têm discutido sobre a Liga das Nações e o Esperanto, advogando a idéa da adoptação da lingua auxiliar por aquella Liga.

Edimburgo — O Professor Ch. Sarolea, em conferencia publica, a 23 de Outubro ultimo, sobre o Esperanto e a Liga das Nações pugnando pela preferencia da lingua auxiliar como instrumento de intercomprehensão no seio da Liga, entre muitas proposições de inconteste veracidade e de immediata utilidade, disse:... — «O esperanto interessa-me principalmente como estudo philosophico e litterario; sem exageração, não conheço melhor disciplina para a mente do que o estudo do Esperanto: é idealmente simples e inteiramente logico; da primeira á ultima regra é a logica applicada.

Posso fallar como perito sobre linguas, porquanto estudei dezoito, e assevero que como instrumento de expressão litteraria, o Esperanto não tem muitos concurrentes entre as chamadas linguas historicas, na-

cionaes e naturaes — Estou convicto que como resultado da guerra, veremos nos proximos futuros annos grande impulso no estudo do Esperanto».

Glasgow — O dia de Zamenhof foi festejado por uma sessão especial e concerto; ante avultada concorrencia o snr Kemedy pronunciou eloquente discurso sobre o dia festejado.

Liverpool — O Grupo Esperantista festejou a 15 de Dezembro a dacta natalicia de Zamenhof, em sessão especial.

A Commissão de Instrucção das escolas elementares sanccionou a introducção do Esperanto no *«Granton Road School»*: isto é já resultado do 10.º Congresso Britanico.

Birmingham — A Commissão organizadora do 11.º Congresso dos Esperantistas Britanicos concluiu os preparativos para esse certamen, que terá logar de 21 a 25 de Maio proximo. Entre os protectores do Congresso, acham-se o Lord Bispo de Birmingham e outras personagens de alta significação social.

Os Esperantistas Socialistas fundaram uma Liga com os seguintes intuitos: 1.º Auxiliar o socialismo internacional, propagando uma lingua commum neutra. 2.º— Unir por auxilio mutuo e camaradagem os socialistas esperantistas esparsos na Grã Bretanha.

2.º—Agir ante o Bureau Socialista Internacional para que seja adoptado o Esperanto, como lingua internacional.

Londres — O *Central Londona Esperanto Klubo*, a 9 de Janeiro ultimo, realizou uma das mais importantes festividades de que ha noticia: concerto, baile, prendas á venda offerecidas pelos socios, etc.

Aberdeen — A 14 de Dezembro foi celebrada, na Igreja Unitaria, um serviço divino á memoria de Zamenhof: a collecta monetaria foi remettida para Vienna para os filhos dos samideanos dessa cidade.

Hollanda. — A commissão permanente dos Congressos Esperantistas, com séde em Pariz, resolveu, de combinação com os collegas Neerlandezes, que o proximo Congresso Universal Esperantista tenha logar em Haya em Agosto a 1920. — Na conferencia internacional dos christãos, effectuada em Outubro ultimo, a qual compareceram representantes da America, Dinamarca, Inglaterra, Hollanda, França, Hungria, Allemanha, Noruega e Suissa, ficou resolvido que na proxima reunião o Esperanto será usado como segunda lingua, sendo todos os assumptos traduzidos para elle e não para qualquer outra lingua.

Allemanha — *Breslau* — A União Catholica Esperantista Universal, adormecida durante a guerra, despertou com enthusiastico vigor. Em Outubro proximo passado, respondendo ao appello da Sociedade Esperantista Catholica — *«União»* — de Breslau, os presidentes dos grupos locaes esperantistas catholicos, até então isolados, adheriram a esse gremio, fundaram a gazeta «Blanka Kruco» e elegeram a directoria — A 5 de Outubro na Igreja Gymnasial de Sta. Matio, o Revd.º Becker, de Bromberg, prégou em admiravel e clara allocução em esperanto, emocionante sermão sobre o thema. «Amor do proximo». Seguiu-se a missa na qual ouviu-se a musica sacra de Schubert adaptada ao Esperanto pelo Snr. Schoeder, de Vienna, «Al kiu mi min turnu», e a «Ave Maria» composta pelo presidente da Liga em homenagem a sublime protectora da Liga.

A Liga convida todos os estrangeiros *samideanoj* que quizerem participar da elevada propaganda a noticiar o seu endereço e o dos amigos a sua séde Karmeliterpl 5 — Graz — Austria.

Austria. — *Vienna.* — A' despeito da situação social deprimente que atravessa esta capital a União Esperantista de Vienna a 9 de Fevereiro organizou uma sessão recreativa litteraria, musical e dramatica, que muito realce e impulso imprimiu ao movimento esperantista que desperta com vivacidade e brilhantismo. O Club esperantista bohemio desta cidade recomeçou os seus trabalhos com grande animação; as gazetas tcheques locaes publicam regularmente noticias sobre o Esperanto. A 18 de Dezembro ultimo, foi solemnisado no salão da União dos Commerciantes Viennenses o dia de Zamenhof. O Presidente Snr. Kaftan e Dr. E. Sór saudaram os circumstantes, fizeram o panegyrico do inolvidavel e querido Mestre e convidaram a manter o compromisso intimo de inteira fidelidade á obra genial do saudoso extincto. Fallou o Snr. Siedl, vice-presidente da Liga Catholica Esperantista Austriaca, sobre o Esperanto, sob o ponto de vista ideal e practico, sobre a sua idéa intima: provou que elle é e permanecerá a solução unica do problema de lingua mundial e que os posteros renderão eterno agradecimento ao seu genial creador.

Hungria. — *Budapest.* — Os serões litterarios esperantistas succedem-se com inteiro exito: o terceiro effectuado em 24 Novembro ultimo, no Museu Social, foi interessantissimo: prelecção sobre o esperanto e a poesia, musica, canto, declamação, etc.

Polonia — *Lodz* — Os esperantistas locaes organizaram uma commissão para a lingua commercial commum com os fins: 1.º Propagar o Esperanto nos circulos commerciaes e facilitar o commercio estrangeiro por meio do Esperanto. 2.º — Abrir agencias onde os commerciantes locaes possam receber propostas, offertas, pedidos, catalogos, e corresponder em esperanto com as firmas estrangeiras. A Commissão deseja ter representante, em centros commerciaes importantes, cujo fim é attender as offertas para as firmas de Lodz e fazer traducções de correspondencia de firmas não esperantistas dos seus districtos. Os interessados podem dirigir-se ao Secretario J. Ĥimoviĉ — Lodz — Polonia. Dluga 90 — Sociedade Esperantista.

Suissa — *Lucerna* — Na sessão de 28 de Setembro da *Svisa Esperanta Asocio,* o Dr. Ed. Privat pronunciou importante allocução sobre a visita feita á viuva do nosso saudoso Mestre: o «Svisa Espero» referindo esta noticia termina o artigo: «*Ho homaro malsaĝa,* al viaj turmentantoj vi konstruas monumentojn, sed al viaj bonfarantoj vi rompas la koron! Homaro! Kiam efektive venos via savonto?»

Italia — *A Junta Esperantista Sul-Italiana,* organizada em 1918, desenvolve activa e intensa propaganda que, apesar dos tempos desfavoraveis actualmente, tem produzido satisfactorios resultados.

Renasce a tentativa de organisação do Grupo Parlamentar Esperantista. Cursos d'Esperanto foram inaugurados ne Sicilia; em Bari, o Professor Lacalendola fez importante conferencia e mantém um curso no Circulo Philologico.

Em Palermo, Syracusa, Taranto e Napoles novos cursos appareceram.

V. S.

Novaj Gazetoj ricevitaj

Nederland — Esperanto. Organo por la disvastigo de Esperanto en Nederlando. Aperas ĉiun jaŭdon. Administrejo: *Diergardenlaan, 64 b. Rotterdam. Nederlando*

Catalunya Esperantista. Periódic intermitent destinat a la propaganda de l' Esperanto. Disdono senpaga. Eldonisto: Joan Amades. *Peu de la Creu* 10 fda. *Barcelona. Hispanujo.*

Blanka Kruco. Liga organo por la germanlingvaj katolikaj Esperantistoj. Aperas malregule provizore. Administrejo: Graz. *Volksheilzentrale, Karmeliterpl. 4/5. Redaktoro:* M. Mielert. Breslaŭ X *Werderstrasse 35. Austrio.*

Esperanta Finnlando. Organo de Esperanto — Asocio de Finnlando. *Nova serio 1920.* Redaktoro Vilho Setala. Ĝi estas intereshava, bonstila, nur Esperanta, ilustrata monata revuo. Provnumeroj senpage riceveblaj. Jara abonprezo: 6 frankoj svisaj. Esperanto oficejo. *Helsinki Kauppiask.* 11 *Finnlando.*

L' Esperanto. Internacia monata revuo sub patronato de Itala Katedro de Esperanto. (Reapero). Redakcio kaj Administracio ĉe firmo A. Paolet. *S. Vito al Tagliamento. Italujo.* Jarabono: Fr. 5.

Esperanto Itala Revuo. (Itala Esperantisto). Oficiala organo de la Itala Esperanta Federacio kaj de la Esperanta Domo. Administrejo: Via Spiga, 29. Milano. Italujo. Jara abono Fr. 5.

Korespondado

Poŝtmarkojn ŝanĝas **E. Nyberg.** *Mikkeli Finnlando.*

Sroj **Fernand Gogoline** kaj **Heinrich Klipp,** *Müllergasse 20, Krassel (Hessen-Nassau) Germanujo,* deziras korespondi kun eksterlandaj samideanoj.

Du finnaj esperantistoj volas korespondadi kun brazilaj esperantistoj. **Lillian & John Salmi.** *Pory.* Et. puistok, 17 Finnlando.

Tarifo por anoncoj

1 Paĝo	30 Fr.	svisaj	20$000
1/2 »	18 »	»	12$000
1/4 «	10 »	»	7$000
1/8 »	6 »	»	4$000
1/16 »	3 »	»	2$000

Por dufoja anoncado rabato da ... 5 %
Por trifoja » .... 10 %
Por sesfoja » .... 20 %

Rabato al la anonckolektantoj.... 10 %